

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĥikago

№5, Majo, 2008

Energio de Vento

Rick Miller, inĝeniero



Vento estas simple aero movanta. Ĝi rezultas de la hejtado je la surfaco de la mondo per la suno. Ĉar nia planedo havas diversajn surfacmaterialojn, ĝi absorbas la sunan hejtadon malebene. Dum la tago, la aero super la tero varmiĝas pli rapide ol la aero super la akvo.

La pli vermigita aero ŝvelas kaj ŝvebas, do la malpli varma aero fluas ene trans la surfaco. Tiu fluado estas vento. Dum la nokto, la aero fluas reen ĉar la aero super la tero malvarmiĝas pli rapide ol tio super la akvo. Tio dependas de energio de la suno kaj la ciklo de la tago, sed pli grandaj, mondkalaj ventoj fluas ankaŭ pro suna energio hejtanta aeron ĉe la ekvatoro pli ol ĉe la polusoj. Tiaj ventoj fluas en bendoj ĉirkaŭ la planedo. Do vento estas suna energio en mekanika formo. Ekde antikva epoko, homoj uzis ventan energion. Antaŭ 5 mil jaroj, la egiptanoj uzis venton por peli ŝipojn sur la rivero Nilo kaj sur la maro. Poste en Irano, homoj muelis grenojn per la unuaj ventomueliloj. Ventenergio muelis grenojn, pumpis akvon, kaj segis lignaĵon. Dum la lastaj cent jaroj, ĝi ankaŭ generas elektron. Ĉi tiu energio estas havebla preskaŭ ĉie. Post la jaro 1930, kiam elektra energio iĝis kutima, oni vidis malpli da vent-radoj. La komuna elektro estas ĉiam preta, sed la vento blovas intermite, do multaj homoj preferas la ordinaran elektran energion. Ventenergio restis favorata nur ĉe distancaj bienoj, kie la elektra potenco malaperis pli ofte ol la potenco de la vento. La “petrola krizo” de la jaro 1973 ŝanĝis la aspekton de energio por Usono kaj por la mondo. Ĝi instigis intereson pri alternativaj energifontoj, inkluzive ventenergio. La ŝtato Kalifornio, ekzemple, establis politikon por evoluigi fontojn de “energio renovebla”. Nun Kalifornio produktas pli da ventenergio ol iu ajn alia ŝtato en Usono. Sed Germanio sukcesis eĉ pli, produktante pli da ventenergio ol la tuta Usono. Vent-radoj estas divers-grandaj.

Oni povus aĉeti malgrandan ilon por ŝargxi poŝtelefonon el ventenergio, aŭ oni povus konstrui vent-radon pli alta, ol 160m por generi sufiĉan elektran energion por miloj da domoj. Venta elektrostacio kutime estas aro de ventradoj kun alia ilaro por konekti ĝin al la elektra reto. Tiuj “ventokampoj” kutime havas multajn ventradojn en granda spaco. Plejofte, ili apartenas al kompanio, kiu vendas energion al la publika elektrokompanio. La kosto por produkti elektran energion el vento malaltiĝas pro novaj teknikoj, kaj pluraj ŝtatoj ofertas impostajn rebatojn al produktantoj de l’ “verda” energio. Pro tio, ventenergio estas la plej rapide kreskanta fonto de elektra energio ĉirkaŭ la mondo.

Ĉar ĝi produktas nenium brulaĵon, ventenergio helpas konservi naturajn rimedojn. Ĝi ne bezonas karbominadon, nek petrolpumpadon. Ĝi ne eligas poluantan fulgon,



nek karbon-di-oksigenon en la atmosferon. Ventaj generiloj estas fabrikataj el kutimaj materialoj (nek ekzotikaj nek venenaj). Foje oni plendas ke ventradoj mortigas birdojn. Tamen, sciencaj esploradoj montris ke tio okazas multe malpli ofte ol oni suspektas. Kiel vi povas uzi ventenergiecon? Nu, pluraj energikompanioj ofertas specialan prezon por garantii ke tiom da energio kiom vi aĉetas estas produktata el renoveblaj rimedoj. Tiu programo en mia regiono de Viskonsino estas nomata "Energio por Morgaŭ" kaj kostas iom pli ol la normala prezo. Mi partoprenas tian programon por kuraĝigi la evoluon de renoveblaj energifontoj. Tamen la elektra kompanio de ĉi areo, "Commonwealth Edison", ne ofertas tian programon. Kion oni farus, se sia elektrokompanio ne ofertas "verdan" opcion? Nu, ĉe multaj ŝtatoj, oni rajtas aĉeti elektron de kiu ajn kompanio de la tuta sistemo! Tio estas la rezulto de ŝtataj leĝoj por malakaparigi la energian industrion. La dratoj apartenas al la loka kompanio, sed ili devas porti al vi la energion el aliaj kompanioj. Tiel oni povas apogi sian preferatan energikompanion kaj povas kuraĝigi la kreskon de alternativaj energifontoj. Bedaŭrinde, la elektra kompanio en Ŝikago ne havas tian programon por domaj klientoj. Laŭ mia esploro de ties paĝaro, nur kompanioj povas aĉeti energion el aliaj fontoj. Eble ĉi tiu ŝtato ne tute malakaparis la energian industrion. Tamen, mi vidis grandegan ventokampon en la urbo, "Mendota". Tie, sesdek tri ventradoj generas elektron por dek kvin mil domoj. Ili staras alte sepdek unu metroj kaj la radioj de la vent-radoj etendas pli ol duono de piedpilka kampo. Iuj homoj malŝatas vent-radojn. Ili plendas ke tiuj turoj difektas la pejzaĝon. Nu, mi rekomendus ke tiuj ne vizitu Nederlando. Aliaj homoj opinias ke vent-radoj aspektas majestaj, kaj ke ili plibonigas la pejzaĝon. Ĉiuflanke, ili ja povas krei multe da energio... nur el aero.

Salutvorto de UEA-Prezidanto

En Ĝenevo, la 28-an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tempo, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza enpeniĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezenta monda Esperanto-organizaĵo. Mi volus tiun ĝojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam dediĉis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvas aliaj kontribuadoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, rerigardi ĝian unuan jarcenton, kaj legi kontribuadojn de aliaj por firmigi nian kolektivan konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem. Feste salutas
Probal Dasgupta

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

27an de Majo – d-ino Gertrude Novak invitas al historio de Ŝikagaj stratnomoj

22an de Junio – tradicia pikniko en la hejmo de Roberto ,
je la 12:00 - 19:00 posttagmeze.

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

